

# AGOS JUNED

HISPANA ESPERANTISTA  
JUNULARA SOCIETO

ATOCHA 98 - 4.  
TELF. 230 87 98  
MADRID - 12  
HISPANIA

maro N-RO  
1984 120

## KAPOBRASIKA ZAMENHOF- -PUPO<sup>®</sup>

Havinda

"Ĉi tiu portreto de Zamenhof estas tiel bela kaj tiel majstre teksita, ke mi kredas neniam antaŭe esti vidinta pli ravan bildon de la aŭtoro de Esperanto." M. A. SANĈO





**Laste  
aperis**

**Pensu pri  
beleco**

Necesa por ĉiu serioza esperantisto.  
Bona decembra donaco

Ĉefa distribuanto:

 H.E.J.S.  SEVILO

Mendebila ankŭ ĉe la Libroservo de UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

La Libroservo de UEA donas rabaton de 33% ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.  
**Kio pleje  
vendigis**

## Redaktoroj: G. KAMAĈO K F.K. MOLEONO

Kunlaborantoj: Zamenhof, Llibert Puig, F.K. Moleono, Ka-maĉisto, SEJO, Luis Hernández, Gonzalo D. Ferrer, María José Quesada, Ismael García Robledos, GEJ-Gazeto, Alberto Franco, HEJSĉjo, Petro Kadavro, Luis Serrano Pérez, , la rebusisto, Juhan Liiv kaj Kordovo kaj Sevilo.

### Enhavo

Paĝo 1	.....	Kapobrasika Zamenhof-puoo
" 2	.....	Ci tio mem
" 3	.....	Leteroj al la Dir.
" 7	.....	Pneŭrovo (El GEJ-Gazeto)
" 8	.....	Cu neomoslige?
" 9	.....	Oficiala informo; abonilo
" 10	.....	R.E.P. (Ripozu En Paco)
" 12	.....	La komputoro
" 16	.....	Kalkulatoraĵo; menuo
" 17	.....	
" 18	.....	Cigno X-1; rebusaĵoj
" 19	.....	Krokodiloj
" 20	.....	Historio pri du urboj

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn, por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.

# LETEROJ AL LA DIR.:

Kara redaktoro,

Ricevinte vian lastan numeron 119/83 mi legis gin kun la kutima intereso kaj malgraŭ tio, ke la primovada laboro superŝutas min senkomplete, mi ne povas silentigi mian gratulon al la aŭtoro de la artikolo, kiun sub la titolo "La duonesperantistoj" eksplikas tre klare kaj kuraĝe unu el la plej gravaj malsanoj de nia samideanaro.

Kiel plurjara aktivulo en la movado mi plene konsentas kun Alberto Franco kaj kun li mi ple- das, por ke la lernintoj de Esperanto fariĝu "kompletaj esperantistoj", t.e. movadanoj, kiuj kunlaboru en la persista kaj anonima tasko dis- vastigi la internacian lingvon kaj ties movadon.

Altestime vin salutas,

Llibert Puig

Prezidanto de Centro de  
Esperanto Sabadell

Sinjoro direktoro:

Mi skribas por demandi de kompleta esperan- tisto (kiu vere rajtas sin nomi tiel!?), kio es- tas labori "per" kaj kio "por" Esperanto.

F. K. Moleono, Madrido

Sinjoro redaktoro:

Esperantistoj dividiĝas en du grandajn gru- pojn: viroj kaj virinoj; la unuaj subdividiĝas en bonajn kaj malpli bonajn, la duaj en malbonajn kaj malbonegajn.

Estimataj samideanoj:

La celo de ĉi letero estas komuniki al vi, ke ni bonorde ricevis en nia sidejo de la strato Pozo 3, HEJS-Junecon, koncizen kaj informojn pri-tendarajn. HEJS-Junecon tre ŝatas ni, kaj inter-krampe ni devas diri al vi, ke ni pensas, ke ĝi neniam devis eliri el Madrido...

Sevila Esperantista Junulara Organizo

Estimata samideano,

Post longmonata uzo kaj dank' al la kunlabo-ro de pluraj junuloj, inter kiuj la via, certe, estas tre grava, aperis nova numero de HEJS-Juneco.

Pri ĝia enhavo, kompreneble de mia persona vid-oukto, mi deziras fari kelkajn komentariojn: unue, sur la kovrilo, vi mencias kiel gravegan informon la fakton, ke Bernard Golden ne skribas en ĉi tiu numero: ĉu tio estas reago al tio, ke artikoloj de Golden aperas en preskaŭ ĉiu esperantlingva re-vuo?

La sekcion "Leteroj al la Direktoro" mi trovas tre interesa, se la leteroj estas aŭtentikaj, nur la unuan mi trovas "iom stranga".

El la ceteraj artikoloj mi trovas plej interes-tiun de s-ano Alberto Franco titoliten "La duone-sperantistoj".

Rilate la situacion de la junulara grupo de Valladolid kaj precipe pri s-ro José Antonio del Barrio, mi povas informi vin, ke dum monatoj ni ne vidis lin, nur la la pasintan dimanĉon kaj okaze de la Generala Kunveno de la Grupo "Fido kaj Espe-ro" ni, post longa tempo, revidis lin kaj tiam ni parolis pri liaj estontaj esperantistaj aktivejoj. Tiam li informis min, ke pro aliaj devoj (univer-

sitataj kaj politikaj) li ne havas tempon por de  
diĉi ĝin al Esperanto.

Per aparta poŝto kaj kiel presajoj ni resendas  
al vi materialon, kiun la valadolidaj samideanoj  
lasis en la sidejo de "Fido kaj Espero".

Nome de la HEP-estraro mi dankas vin pro la  
aperigo ene de la revuo de la aliĝilo por la Na-  
cia Kongreso okazonta en Seviljo. Pri la esperan-  
tigo de la nomo Sevilla en Esperanto (Sevilo, laŭ  
PIV; Seviljo, laŭ la esperantistoj tie loĝantaj),  
oni povus aperigi komentarion en HEJS-Juneco. Mi,  
persone, preferas Seviljon, ĉar ĝia prononcado  
similas al tiu en la hispana lingvo.

Ni dankus, se en venonta numero de HEJS-Juneco  
vi informus al ĉiu junulo jenan sciigon:

"Junuloj, la Nacia Kongreso de Esperanto oka-  
zinta en Zaragozo akceptis la proponon de la re-  
prezentantoj de HEJS, ke la jara kotizo por la nuna  
jaro por la membroj de HEP-HEJS estu 750 pes. Tiu  
ĉi kotizo validas por junuloj malpli ol 26-jaraj.  
Pagante al HEP, kunsendu dokumenton taŭgan pri la  
aĝo."

Kore salutas vin,

Luis Hernández

Sekreterio de Hispana E-Federacio

Redakcia respondo:

Mi dankas vin pro viaj afablaj gratuloj. Tamen,  
vi preteratentas la fakton, ke ĉi revuo havas ne unu,  
sed du redaktorojn. Rigardu atente la duan paĝon.  
Se la helpo de G. Kamaĉo estis grava, ne malpli  
grava estis la helpo de F.K. Moleono. La farado de  
HEJS-Juneco ŝuldiĝas samrajte al ĉiu el ili. Bonvolu  
memori tion venontfoje. Memoru ankaŭ, ke ili du  
ne helpis: ili faris la revuon, kio estas malsama  
afero.

Al la direktoro:

Mi gratulegas vin pro via tre interesa bulteno, speciale pro la lingvaĵo en ĝi aperanta. Ĝi certe estas la revuo LINGVE PLEJ GUSTA EN LA TUTA HISPANIO, bela kaj uzenda modelo por multaj aliaj revuoj. Cefe por la erarplenega Boletín.

Gonzalo D. Ferrer

Estimataj amikoj,

La malĝusta uzado de la Esperanta streketo (-) instigis min sendi leteron al ĉi tiu fako por klarigi ĝian ĝustan uzadon.

Streketon oni povas (kaj devas) meti inter la vorto ĉi kaj la adverbo aŭ adjektivo ĝin sekvanta, sed neniam interen de ĉi kaj substantivo. Mi donas ekzemplojn: ĉi-lande, ĉi-apude, ĉi-kuna, ĉi-rilata. Ĉi lando, ĉi tablo, ĉi revuo, ĉi lingvo. Grava estas la diferenco inter "ĉi landa birdo" (ĉi tiu birdo, apartenanta al nedefinita lando) kaj "ĉi-landa birdo" (birdo de ĉi tiu lando).

Scenton faras la tabelvortoj, ĉe kiuj oni neniam uzas la streketon: tiu ĉi, ĉi tio, ĉi tie, ĉi tiel.

María José Quesada, Malago

Kara direktoro:

Mi volas proponi neologismon pri ĉiutagaĵo: "imano". "Imano" estus neologismo anstataŭ la dua PIV-a senco de "magneto", tio estas, artefarite magneto - kutime hufferoforma. Deveno: F.- aimant; H.- imán; I.- imano; Po.- iman.

Ismael García Robledos, Toledo



RUSTLANDO

UNIO DE LA  
ŜIKANITAJ SOLVITAJ  
RUSPUBLIKOJ

EKRANIO

EL ĜEJ-Gazeto

MATLANTIKO

LITBRUO  
PORTU GAŬLON

PISKAJA  
GOLFO

MISPANIKO  
MURDRIDO  
(MERDRIDO)  
CIVDAD SURREAL  
GRANATO

MEDITA KOŝMARO

DAMN-  
LANDO

TEDA  
LANDO

TRANCIO

VITALIO

KLOR-  
SUKO

SARDONIO

ŜVITCILIO

VEI-  
GIO

ŜOK-  
HOLMO

KOT-  
EN-  
BURĜO

HAPS-  
BURĜO

AŬTIO

FLVOR-  
ENCO

BROMO

SATANIA

POLV-  
LANDO  
(=PALLANDO)

ŜOKOSLOVRAKIO

KUN KARIO

JUGO-SKLAVIO

BROMO

SATANIA

INTRIGA

KATENIN-  
GRAD

GTANKSKO

L'VOM

KUN KARIO

JUGO-SKLAVIO

TIR-  
AND

FEKLANDO

UNIO DE LA  
ŜIKANITAJ SOLVITAJ  
RUSPUBLIKOJ

ĈERKOVO  
KIEL?

RUBA-  
ĴUJO

VULGARIO

FEKA MARO

MOŝTKVOTO

JODESKA

MONSTRANCO

KATASTROFIA

ISMO

FEKA MARO

FEKA MARO

ISMO

FEKA MARO

FEKA MARO

7

## ĈU NEOLISMOGE<sup>1</sup>?

La vetero estis jae pluvema; la ĉielo aspektis angrifa kaj ankoraŭ oni povis vidi kelkajn gestirnojn, kiuj aperis kaj malaperis surĉiele laŭ la volo de la kovremaj nubetoj. Estis kalte, je la oka frumatene. Kvazaŭ ĉielidaj estaĵoj, ree flugadis daŭre la unuaj fogeloj de la mateno. De ĉielpunkto al alia ĉielpunkto dancfluge iradis kaj revenadis miaj altaj amikoj. Ĉu vi ne mildiĝas pro tiom da iraj kaj revenaj senlacflugadaj surĉielaj promenadoj? Ĥore antvortis la birdaro: verstandeble ne; ni estas la forto de la ĉielo kaj havas serkameradojn. Ekdo, mi decidis abandoni la grundon de mi piedtrotatan kaj ekakompani miajn novajn amikojn tra ilia senlaca blua irado. Sadene, la ĉielkoloro ŝanĝiĝis. La suno aperis ŝlafeme ĉe la okcidento kaj kuris rapide al la oriento. La birdaro sekvis ansieme la sunon tiel rapidege, ke mi ne povis elteni mian laciĝon. Do, mi devis halti kaj la birdaro plus la suno malaperis ĉe-horizonte. Kia ŝmerzo! Mi ne povis sekvi miajn amikojn. Do, antaŭ tia situacio mi decidis murdi min. Mi ne povis elteni tian ege grandan ŝmerzon. Tiel finiĝis mia vivo. Sajse!

Klarigo de la aŭtoro: tiun stultaĵon, kiun vi ĵus legis, mi elensis post haŝiŝfumado. Se HEJS-Juneco publikigos, tio signifos, ke ili estas pli stultaj kaj haŝiŝemaj, ol mi. Tankon!

Alberto Franco

1



8

SALUT<sup>2</sup>! MI <sup>2</sup>STAS HEJSĈJO, L<sup>3</sup>  
PRESEJA KOBOLD<sup>2</sup> DE HEJS-JUNEC<sup>2</sup>:  
L<sup>3</sup> originala titol<sup>2</sup> de ĉi artikol<sup>2</sup>  
<sup>2</sup>stas: ĈU NEOLOGISME?



# OFICIALA INFORMO

En la tendaro en Kordovo elektigis la komitatanoj B kaj C de nia organizo. La komitatanojn B elektas la individuaj membroj. Laŭ la aktualaj membro-nombroj, ili rajtas je tri komitatanoj. La komitatanojn C elektas la tuta komitato, ĝis maksimume unu sesono de sia nombro. Ĉar ekzistas kvin komitatanoj nun, kaj en Kordovo aperos ne pli ol tri, la komitato rajtos je unu komitatano C. Komitatanoj A ne ekzistas, ĉar HEJS havas nul aliĝintan asocion. La siproponoj por komitataneco okazos en la tendaro mem, do nepras ĝin ĉeesti, se oni deziras iĝi komitatano. Kompreneble, okazos ankaŭ la balotado de la ĉeestantaj HEJS-membroj en la tendaro pri la siproponitaj kandidatoj al komitataneco, se tia balotado montriĝos necesa.

---

GAZETO  
ANDALUZIA

DUMONATA REVUO

6 numeroj jare

ABONILO

\_\_\_\_\_ )  
kiu loĝas en \_\_\_\_\_ ( \_\_\_\_\_ )  
strato \_\_\_\_\_ n<sup>o</sup> \_\_\_\_\_  
deziras ricevi la revuon GAZETO ANDALUZIA  
dum la jaro 1984.

ABONO

200 pts / 12 steloj

Dato:

Subskribo

9

Sendu al: S-ano ANDRES MARTIN

MALAGA-1

Centro Cultural GFU (Esperanto) C/ Trinidad Grund 28, 2<sup>a</sup>

---



S-ro

R.F.E.R.

\* Bv. skribi la nomon de unu el viaj malamikoj, preferere se temas pri krokodilo. Dankon. (El "kiv ne faru kivon").

# LA KOMPUTORO sin mesa!

Jes, la konstanta martelado de la propagando enŝoviĝis ankaŭ en nian hejmon, kaj ni fariĝis ĝiaj viktimoj. Por bona organizado de nia hejma vivo, ni decidis aĉeti komputoron, kiu bone kaj ĝustatempe reguligu niajn ĉiutagajn taskojn aŭ okupojn.

Tiom da kapdoloroj donis al ni la vivo, ke ni konsideris necesa kaj urĝa la aĉeton de tiu "vivanta kaj pensanta maŝino". Sed unu afero estas la propagando, niaj bonaj intencoj, kaj alia la rezulto. Eble ni ankoraŭ ne estas sufiĉe modernigitaj homoj, ĉar la vero estas, ke multaj miskomprenoj okazis inter ni kaj nia "fidela servisto".

Ĝia manipulado estas simpla, facile lernebla. Estas butonoj kun siaj respektivaj klarigoj, kaj strangaj lumoj diverskoloraj, kaj aparte menciinda estas la voĉo de tiu "sinjoro", ĉiam en la tono dezirata, ĝi neniam malvarmumas. Krome, ĝi restas muta, se tion ni deziras.

Nu, ni komencis utiligi ĝin. Tiucele ni metis du ordonojn al nia komputoro: avertu min je la oka horo por ellitiĝi. La sekvantan tagon, ĝuste je la oka horo, ĝia voĉo avertis min: "Sinjoro Serrano, nun estas jam la oka horo". Mi prokrastis iomete mian ellitiĝon, ĉar, kiel bona edzo, mi deziris iomete karesi mian edzinon, kaj jen la fera voĉo denove: "Sinjoro Serrano, vi malfruos, vi malfruos..." Kompreneble, ankaŭ mia edzino deziris ĝin utiligi kaj jen ŝia ordono: "Avertu min je la dek-unua horo, ĉar mi devas viziti la frizistinon. Ekzakte je la difinita horo ĝi diris: "Sinjorino Maria, nun estas jam la dek-


unua horo, iru al via frizistino", sed ŝi ankoraŭ ne estis preta kaj tute nervozigis, ĉar nia servisto daŭre insistis: "Estas jam la horo, sinjorino Maria... estas jam la horo, sinjorino Maria" kaj fine mia edzino ĝin subite silentigis, malŝaltis.

Ni iom diskutis pri tio, ĉar mi opiniis, ke ni devas esti iomete pli akurataj en niaj agoj, ke ni devas ordigi niajn vivojn. Ŝi konsentis, sed opiniis ankoraŭ, ke ni devas resti pli liberaj kaj ne ĉiam obei tiun "inferan maŝinon".

Vi jam povas kompreni, nia diskutado estis longa, kvankam tre afabla. Nenio en la vivo kapablis detrui nian reciprokan kamaradecon, kaj evidente tiu amaso el feraĵoj ne disigos nin, kaj multe pli grave se estas ni, kiuj devas ĝin programi. Nu, fine ni venis al la konkludo jena: ni programos nian "helpantan maŝinon" kun ĉiuj hejmaj taskoj, eĉ kun tiuj personaj, kaj, ankoraŭ pli, kun niaj seksaj rilatoj. Rilate al ĉi tiu lasta punkto, es-

tis tute plena konsento, ĉar, laŭ ŝi, mi ofte estis iomete neglektema tiurilate, kio donis al ŝi motivojn pensi, ĉu mi trinkas el aliaj fontoj por kontentigi mian seksan soifon, kio ja ne estis vero, bedaŭrinde!!

Vi jam povas imagi, kiom da problemoj, ĉar mi forĝis paroli ĝis nun pri niaj tri filoj, kiuj ankoraŭ deziris ĝui la avantaĝojn de la progreso de la civilizo. Konstante la voĉo de nia "ĉarma helpanto" estis



en la aero: "Estas jam la horo, sinjoro Serrano... estas jam la horo, sinjorino Maria... knabo Luis, faru tion... knabino Angela, via amiko vin atendas... knabo Jozefo, atentu pri via lerneja laboro... sinjoro Serrano, vi ankoraŭ ne skribis la artikolon por "Boletín", sinjorino Maria, atentu la dek-duan, ke la tagmanĝo estu preta". KREDU MIN, karegaj, ni ĉiuj kuradis de unu loko al alia, la ĥaoso estis nepriskribebla, ĝis ŝajnis hejmo de robotoj frenezaj. La vero estas, ke neniu el ni kapablis adaptiĝi al tiu programita kaj metoda vivo, kiu ja estis de ni elektita.

Mi povus rakonti al vi centojn da anekdotoj de nia nova vivo, tamen permesu al mi rakonti nur tri el ili, kiuj respegulas la ekscititan vivon regintan inter ni. Unu tagon ni jam estis enlitiĝintaj, kiam la voĉo de nia "domano" avertis nin: "Gesinjoroj Serrano, alvenis la momento de via plezuro, jes, estas la momento de via koito". Aŭskultu, edzineto, mi atentigis ŝin. Sed kion diras tiu "sovaĝa maŝino", tio ne eblas, ŝi respondis, dum ĉi tiuj tagoj mi havas la menstruon. Sed vi ja estas, kiu ĝin programis, mi aldonis. Jes, ŝi respondis, sed ĝi antaŭvenis, kion mi povas fari?, mi ne kultas.

Estis dimanĉo kaj nin vizitis niaj familianoj. La virinoj komencis interparoledi pri la vetero, pri la manĝaĵoj, pri diversaj sapoj, pri malsanoj. Mi ne scias, ĉu ilia konversacio estis grava, sed fakte ĉiuj samtempe babiladis, kaj la bruo estis granda. Ni, la viroj, okupiĝis pri la senlaboreco, pri la futbalo kaj iuj rakontis spritaĵojn. Do, nia vespera familia kunsido estis agrable, ĉar, kion oni povas postuli inter familianoj? Eĉ ni trinketis dolĉan vinon. Nu, kiam la paco kaj kom-

prenemo regadis nian familian etoson, la "sinjoro komoutoro" diris: "Jam estas tempo, ke tiuj enuiĝaj, babilemaj kaj tedaj gefamilianoj foriru". Atombombo ne povus okazigi oli grandan katastrofon, niaj gefamilianoj stariĝis kaj foriris oli rapide ol fulmo. K<sup>1</sup>a situacio, kia situacio!! Kial la tero ne malfermiĝis kaj englutis nin! Poste mia edzino, vi jam povas imagi, kian rozarion de adjektivoj ŝi dediĉis al mi. Sincere mi estis senkulpa. Poste ĉio klariĝis: mia filo Luis estis, kiu metis tiun ordonon al nia "fidela servisto", ĉar dum nia familia kunsido li ne povis aŭskulti rok-muzikon.

Alian vesperon, jam iomete malfrue, mia edzino kaj mi sidadis trakvile televidante, kiam subite nia "lojala servisto" diris: "Gesinjoroj Serrano, estas la horo por via seksa kaprico, do iru al via lito". Ho patrino mia, kion diris tiu maŝino! Mia edzino subite saltis el la brakseĝo, kiel lenoro malkovrita de hundo en sia kuŝejo, kaj komencis krei: "Vi manipulis la komoutoron, vi estas senhontulo, kia edzaĉo, nun mi ne deziras seksumi" kaj multajn aliajn ĝentilaĵojn ŝi diris. Mi devas konfesi, ke jes, mi ŝanĝis la programon de nia "reganĉo", mi tion faris por ŝin komplezi, sed mi erare agis. Kompreni la virinojn ne estas facila tasko. Mi intencis kvietigi, konsoli ŝin, mi estis karesema, mi dorlotis ŝin, ktp., ktp.... ni paciĝis, kaj post kelkaj kisetoj, ni estis denove la bonaj amikoj, ŝi eĉ ridetis. Tamen mi devis kontentiĝi per televidado, ĉar neniel ŝi volis obei "nian gvidanton", sed kompreneble mi ne diris al ŝi, ke mi manipulis la "mekanikan cerbon".

Fine ni venis al la konkludo, ke tiu "mirakla maŝino" tro komplikigas nian vivon, kaj ni ĝin destinis sole, por ke ĝi nin avertu pri tio: ĉu la do-

ma enirordo estas fermita vespere, pri la situo de la gasŝlosilo, por oportune meti la rubaĵojn eksteren...

Kvankam de tempo al tempo mi devis aŭdi riproĉojn de mia edzino rilate al tio, ke denove mi ne atentis pri miaj edzaj seksaj devoj, kaj reaperis la suspektoj, ke mi sendube trinkas el aliaj fontoj, tamen tiurilate, la fama, moderna, taŭga, perfekta, serioza, senerara, scienca, efika, ktn, ktn.... komputoro ne plu funkciis. (LUIS SERRANO PEREZ)

ENLAMONDONVENISNOVASENTOTRALAMONDOIRASFORTAVOKOPER

## K A L K U L A T O R A Ĵ O

Kio estas tio, kion oni povas lerni per deklaciona lernolibro en nur tri monatoj? Solvu per kalkulatoro, dividante la nombron de tiuj monatoj per la nombro de la lecionoj. Kiam vi havos la rezulton, renversu la kalkulatoron kaj legu.

PLUGILOJ DE FACILAVENTONUNDELOKO PLUGUGIALLOKONEALGLA

Menuo de la redaktoroj, kiam ili kuniĝas por elfari HEJS-Junecon:

Premanĝo: sandviĉo

Manĝo: sandviĉo  
sandviĉo  
sandviĉo

Deserto: sandviĉo  
sandviĉo

Trinkaĵoj: biero

VOSANGONSOIFANTAGILAHOMANTIRASPAMILIONALLAMOND'ETE

Ciu el ni iam deziris vidi siajn pensojn aŭ desegnojn sur paĝo de revuo: jen apude blanka paĝo, por ke vi plenigu ĝin kaj plenumu vian deziron. →

Il est de la nature de la chose que l'on vend  
de la nature de la chose que l'on vend

Solvent de la nature de la chose que l'on vend  
sur la base de la nature de la chose que l'on vend

Il est de la nature de la chose que l'on vend  
(solvent de la nature de la chose que l'on vend)



Il est de la nature de la chose que l'on vend  
sur la base de la nature de la chose que l'on vend



# FIENNO-1

Ni atendas viajn artikolojn por ĉi tiu fakto.


---

Solvoj de la rebusoj aperintaj en la pasinta n-ro:  
sur la paĝo 11: Temp' estas mono (temp' estas;  
mo; no)  
sur la paĝo 21: Kordovo (kor; d; ov; o)


---

rebuso-rebuso-rebuso  
(solvoĵa en la venonta numero)

plia rebuso'  
(same)



Oficiala      ↑ .



Mi eniris la sorĉitan  
domon kaj vidis...

# KROKODILOJ

Kruela dio iĝis por la land'  
la aĉa krokodila band'  
-en land' egipta estis tia stat'-,  
indulgo mankis sen kombat'.

Malforta iĝis la popol',  
sed kreskis krokodila rol';  
foriĝis la popola fort',  
timigis ĝin la vastre vort'.

Suferi multe devis hom'!  
Funebri, fasti sen bezon'!  
La monstrojn fine pro neces'  
mortigis oni kun sukces'.

Kun rido kaj kun ironi'  
traktata estis nun la di':  
la monstrajn krokodilojn do  
senkaŭze oni timis tro!


Juhan Liiv, el "Al abelujo ĝi flugas",  
en traduko de Hilda Dresen.

Redakcia noto: la aŭtoro verkis ĉi poemon  
rilate la verajn (verdaĵn) krokodilojn. Ni  
pensas, ke la esperantistoj, precipe his-  
panaj, scios vidi kroman signifon - tio es-  
tas nia intenco.



# KORDOVO,

nia ĈI-JARA tendarur'bo



# SEVILO,

nia ĈI-JARA kongresurbo

